Thomas Moore,

# ’T is the Last Rose of Summer

’T is the last rose of summer left blooming alone;
All her lovely companions are faded and gone;
No flower of her kindred, no rosebud is nigh,
To reflect back her blushes, to give sigh for sigh.

I’ll not leave thee, thou lone one! To pine on the stem;
Since the lovely are sleeping, go sleep thou with them.
Thus kindly I scatter thy leaves o’er the bed,
Where thy mates of the garden lie scentless and dead.

So soon may I follow when friendships decay,
And from Love’s shining circle the gems drop away.
When true hearts lie wither’d and fond ones are flown,
Oh! who would inhabit this bleak world alone?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25).*

*Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo* `http://www.franks.org/fr01066.htm`*. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon* `http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore`*.*

Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l’ somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor’ parenca, nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular’ ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l’ amikeco flor’ fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton’ juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj, sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?

*Traduko de la Angla poemo “’T is the Last Rose of Summer” de* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* ANTONI GRABOWSKI *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo* `http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT`*.*